# *Raúl Castro investis per titoloj de herooj la kvin kubanoj.*



La kuba prezidento Raúl Castro investis per la titolo de Heroo de la kuba respubliko kaj la ordeno Pla?o Girón al Gerardo Hernández, Ramón Labañino, Antonio Guerrero, René González kaj Fernando González, kiuj plenumis maljustajn punojn en Usono pro la kontrolado de agoj kiuj minacis la kuban sekurecon.

Gerardo Hernández, nome de siaj kamaradoj kaj propranome, dankis la honorigon kaj esprimis ke la unua penso de ili kvin estis por homo, li aldonis, kiu "instruis al ni ke la parolo kapitulacio ne ekzistas por la revoluciuloj", kaj li aldonis, "?efkomandanto, tiu ?i honorigo kiun ni fiere akceptas estas anka? via".

"Nia misio ne fini?is, vi povas ali?i", esprimis Gerardo al tiuj kiuj esprimis sian pretecon realigi la sinoferon de La Kvin.

La aktualigo de la socialista modelo kuba postulas agi kun kompromiso, ?ageco, kaj, li asertis: "Estas kaj estos pluraj manieroj defendi Kubon kaj Kubo bezonos multajn fidelajn manierojn esti defendata."

Pro ilia lo?aleco al la idearo de José Martí, Apostolo de la kuba sendependeco, ili ricevis tiun honorigon en foresto, la 29-an de decembro de 2001, en speciala sesio de la parlamento.

Kun tia titol-investo al la kvin herooj, oni festis en Havano la 120-an datrevenon de la rekomenco de la sendependiga milito.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/47683-raul-castro-investis-per-titoloj-de-herooj-la-kvin-kubanoj


Radio Habana Cuba